

Protokolo de la Komitato de ILEI

de la kunsido de la komitato dum la 44a ILEI Konferenco
la 19an de julio 2011

1. Kunsido de la komitatanoj okazis en Kopenhago (Danio) en la tago de la 19 de julio, 2011 ekde la 15:30h.
2. Ĉeestis: kvorumo de 30 komitatanoj.
3. La kunsidon gvidis: la prezidanto de ILEI - Stefan MacGill
4. Protokolanto: Teresa Liberska
5. Komitatanoj akceptis per aplaŭdo proponojn de la estraro pri du honoraj membroj, kies biografioj aperis en nia retejo: Bertil Andreasson – iama kasisto de ILEI tra 17 jaroj kaj Mauro La Torre – plurjara antaŭa prezidanto de ILEI. Ambaŭ Honoraj Membroj multe laboris por ILEI kaj estis gravaj personoj por la progreso de nia Ligo.
6. Komitatanoj per voĉdono nuligis tri landajn sekciojn: la britan, rusan kaj iran. La rezulto de la voĉdono estis: 17 – jes; 2 – ne; 9 – sindeteno. Ĉi tiuj sekcioj delonge ne plenumas siajn statutajn deojn kaj ne estas kontakto kun ili.
6. La sekva punkto de la kunsido rilatas al elekto de nova sekretario. ILEI bezonas novan sekretarion, ĉar sen sekretario amaso de la laboro lamas. La elekto-komisiono ne sukcesis trovi kandidaton. Post longa diskuto, la punkto restis ne plenumita.
7. Elekto-komisiono por la periodo 2011-2014.
La prezidanto prezentis la nunan situacion: ILEI havas nun 3 membrojn laborantaj en la elekto-komisiono:
 - Isikawa Tiekō – Japanio;
 - Aurora Bute – Rumanio;
 - Ana Montesinos - BritioNe estas novaj proponoj kaj la ĝisnuna komisiono bone laboras. Komitatanoj unuvoĉe akceptis la saman komisionon por la periodo 2011-2014 per aplaŭdo.
8. Komisionoj:
 - komisiono kunlaboranta kun UN kaj UNESKO - komitatanoj unuvoĉe akceptis proponon, ke la nuna komisiito, Rob Moerbeek, havu helpantojn tiel ke fondiĝu komisiono. La komitatanoj akceptis duan personon por la komisiono: Leyeester Miro el Brazilo.
 - revizora komisiono – oni devas precizigi en la regularo la komenc- kaj fin-datojn de la mandato por la revizora komisiono.
La regulara revizio [*poste akceptita*] proponas:
 - la komisiono estu min. 2-persona,
 - ĝi ekkomencu agi 6 monatojn post la momento de la elekto de la nova estraro.
 - anoj de la komisiono devas loĝi en la sama aŭ proksima lando en kiu loĝas la kasisto.

Necesos trovi novan svedan revizoron se la kontoj ne estas transigitaj al Nederlando ĝis la jarfino.
9. Eksteraj rilatoj – ni serĉas komisiiton, la punkto restis ne solvita.
10. Juna Amiko: peto al komitatanoj, ke ili serĉu redaktoron por la revuo Juna Amiko. La ĝisnuna redaktoro Géza Kurucz laboros ĝis la fino de la jaro 2011. Oni devas proponi novan redaktoron, kiu transprenos redaktan laboron.
11. Historio, vikipedio: ĝis nun la informo pri ILEI en Vikipedio estas malgranda. Propono: oni devas trovi homojn, kiuj prizorgos la informojn pri ILEI en interreto, en Vikipedio, k.t.p.

12. Alvoko al komitatanoj: dum UK en Kopenhago, oni devas trovi la homojn, kiuj deĵoros ĉe la tablo de ILEI por doni informojn pri ĝia agado por esperantistoj kaj reklami la organizon. Necesas studi la lokojn kie ILEI povus aŭ devus aperi.
13. La lasta punkto de la tagordo: altigo de la prezoj por ILEI-membreco kaj por abonado de Juna amiko. Propono por komitatanoj, ke ili akceptu la sekvajn prezojn:

de la ILEI-membreco:

- kun papera revuo A-landoj: 20 Eŭroj. La prezo altiĝos je 11%.
- kun reta revuo A-landoj: 10 Eŭroj. La prezo altiĝos je 25%
- kun papera revuo B-landoj: 10 Eŭroj. La prezo altiĝos je 11%.
- kun reta revuo B-landoj: 5 Eŭroj. La prezo altiĝos 25%

de la revuo Juna amiko:

- A – lande: 16 Eŭroj. La prezo altiĝos je 14%
- B – lande: 11 Eŭroj. La prezo altiĝos je 22%
- kvantrabato – A-lande: 13 Eŭroj; la prezo altiĝos je 18%
- kvantrabato – B-lande: 9 Eŭroj; la prezo altiĝos je 28%

La propono enhavis detalan motivigon pri la neceso de tiaj altigoj kaj ties detaloj.

Post longa diskuto en kiuj pluraj praktikaj sugestoj estis faritaj, la komitatanoj akceptis la proponon per la voĉdono: 26 –jes; 2 – ne; 2-sindeteno. Propono altigi la retan abonon ĝis la nivelo de la papera ne trovis subtenon. Simile okazis ĉe propono altigi la A-landan paperan membrecon ĝis 22 Eŭroj.

Okazas diskutoj pri la eblo transigi la presadon kaj ekspedadon de JA al malpli kosta lando, kiel ekzemple Pollando.

Per la akcepto de la altiĝo de la prezoj, komitatanoj esprimis sian aprobon al la nunaj reformoj proponataj de la estraro kaj al la antaŭeniroj en la liga agado.

La kunsido finiĝis je 17:45